## Kiujn goistojn USIKUBO 9p ŝatas?

Oni ofte diras, ke mia vizaĝo kaj korpo similas al TAKEMIYA Masaki {武宮 正樹} 9p. En Japana Go-Instituto ofte oni prenas min por li. Certe mia vizaĝo kaj korpo similas al li, sed mia arto ne similas al lia. Tamen mi tre ŝtatas lia ludmaniero. Mi estas unu el favorantoj, kiuj esperas, ke kiom alte fariĝos lia arto.

El modernaj goistoj, mi ŝatas ankaŭ ludmaniero de HUZISAWA Syuukou {藤沢 秀行} . Antaŭe mi konsiliĝis kun li pri mia ludo. Tiutempe li ankoraŭ drinkadis, kaj en la konsiliĝo li duone dormas, sed ĉe la grava situacio en la ludo, li indikis mirinde akran ŝtonmeton. En lia juneco oni esprimis ke li havas "nenormalan sencon". Eble ĝusta estas lia senco, tamen ordinaraj personoj taksis lin "nenormala". Mi elkore admiris lian sencon, per kiu bone utiligi potencon de ŝtonaro.

Se mi devus nomi nur unu goiston kiun mi plej ŝatas, mi nomas HON-IN-BOU Syuuei {本因坊 秀栄} en MEIZI {明治} erao. Oni ofte diskutas, kiu estas pli forta el Majstroj estintaj kaj modernaj plej fortuloj. Multaj opinias ke modernaj estas pli fortaj, sed mi opinias ke la plej forta estas Syuuei.

Estas du flankoj de forteco en go ludado, unu teknika kaj alia fizika. Certe en teknika flanko, pli progresaj estas modernaj goistoj. Tamen se Syuuei reviviĝus nuntempe, li tuj lernus la teknikajn progresaĵojn. Ĉi tiam, venkus tiun kiu havas pli fortan korpon. Mi kredas ke neniu el modernaj plej fortaj goistoj havas pli fortan fizikon ol Syuuei.

Syuuei fariĝis plej forta, post li promociiĝas al 7a DANNulo, en la 19a jaro de MEIZI erao, kiam li aĝis 35 jarojn, post la serio de 10 matĉoj kun HON-IN-BOU Syuuho {本因坊 秀甫}. (En ĉi tiu serio, lastan matĉon Syuuei ludas kiel 7a DANNulo. Kontraŭ Syuuho 8a DANNa, komenciĝas la serio de 10 matĉoj por Syuuei kiel 5a DANNulo, havantan nigron konstante, en decembro de la 17a jaro de MEIZI erao. Ĝis la 6a matĉo Syuuei venkis 2 ludojn kaj malvenkis 4 ludojn. Sekve Syuuei venkis 3 ludojn kaj malvenkis 1 ludon, do li finis la serion egale.)

Kial tiel fortiĝis Syuuei, kiu konstante havis nigron kontraŭ Syuuho? Post la serio de 10 matĉoj, li transmare veturis al OGASAWARA insulo {小笠原島}, tie li studadis formaciadon de goo, farante dek mil ludojn. Cetere, sufiĉe akumulita vera forto ekaperas en iu ŝanco. Eble por Syuuei la ŝanco devis esti la serio de matĉoj kun Syuuho kaj la dek mil ludojn da studado de formaciado. Rimarkinde estas la forteco de Syuuei post tio.